

La date à retenir :

mercredi 26 mai
18h30 à Angers
Maurice Foucher présentera
son séjour en Tanzanie
(voir page suivante)

Quelques mots

Notre Feuille d'Angers fait peau neuve, et dans une présentation plus moderne, et dans son contenu. Nous essayerons de donner plus d'informations relatives à l'espéranto dans le monde. Notre assemblée générale du début d'année a réuni 25 adhérents. Merci à ceux qui sont venus et nous avons pensé à ceux qui n'ont pas pu se déplacer.

N'hésitez pas à nous faire part de vos remarques. Merci d'avance.

Pierre Jagueneau, Président

Trésors de notre bibliothèque

VOJAĜO AL KAZOHINIO de Sándor SZATHMÁRI

Pour mesurer la place importante occupée dans la littérature de l'espéranto, par des écrivains, poètes, traducteurs hongrois, il suffit d'évoquer les noms de Kalocsay, Baghy, Tárkony, Szilágyi, Emba, Nemere ou la prestigieuse revue d'avant-guerre *Literatura Mondo*.

C'est dans cette lignée que s'inscrit Sándor Szathmári (1897-1974).

Szathmári peut figurer dans la liste des auteurs satiriques et utopistes dont on retrouve aussi le genre dans certains films contemporains.

Nous possédons de lui des recueils de nouvelles mais son ouvrage le plus important est sans conteste son roman «Vojaĝo al Kazohinio» (*Voyage à Kazohine*).

Le livre reprend le thème des voyages de Gulliver : un naufragé aborde le rivage d'une île inconnue. Et tout d'abord, le territoire d'un peuple d'hommes-robots, vivant comme dans une fourmilière, avec des techniques de science-fiction (du moins pour l'époque du roman : 1935). Une société uniquement centrée sur l'utilité collective, sans états d'âme individuels.

Le héros tombe amoureux d'une femme... uniquement préoccupée, hélas, par son quota de grossesses ! Excédé par cette vie insupportable, notre naufragé demande à être exilé dans l'autre partie de l'île, là où vivent des hommes bien différents. Mais quel contraste !

Dans cet autre univers, les êtres sont enserrés par une multitude de tabous incompréhensibles, de croyances invraisemblables et des rites extravagants.

Finalement le personnage du roman réussira à s'enfuir et sera recueilli par un navire en mer.

Le lecteur trouvera des longueurs dans la seconde partie du livre et le style de Szathmári n'est pas exemplaire, mais la lecture de l'ouvrage ne vaudra que si elle ouvre le champ à de nombreuses réflexions philosophiques concernant les deux communautés humaines présentées :

Une société, basée uniquement sur la «déesse Raison» privilégiant uniquement l'efficacité, la réussite collective, ne conduit-elle pas insensiblement vers la tyrannie absolue ?

A l'inverse, les nouvelles quotidiennes ne nous apportent-elles pas les échos malfaisants de groupes humains aveuglés par les fanatismes exacerbés de toutes espèces ?

André FRANGEUL

Kelkaj vortoj

Nia Anĝeva Folio renoviĝas, kaj en pli moderna prezento, kaj en siaj artikoloj. Ni provos doni al vi pli da pri-Esperantaj novaĵoj el la mondo.

Nia ĝenerala kunveno, en tiu jarokomenco arigis 25 grupanojn.

Dankon al tiuj, kiuj ĉeestis, tamen, ni kore pensis al tiuj, kiuj ne povis veni.

Ne hezitu transdoni viajn rimarkojn al ni. Antaŭdankon.

Pierre Jagueneau, Prezidanto

Trezoroj de nia biblioteko

VOJAĜO AL KAZOHINIO de Sándor SZATHMÁRI

Por mezuri la gravan lokon, kiu estas okupita en la Esperanta literaturo, de verkistoj, poetoj, tradukistoj hungaraj, sufiĉas elvoki la nomojn de Kalocsay, Baghy, Tárkony, Szilágyi, Emba, Nemere aŭ la antaŭmilitan prestiĝan revuon *Literatura Mondo*.

En tiu deveno enskribiĝis Sándor Szathmári (1897-1974).

La libro reprenas la temon de la vojaĝoj de Gulliver : ŝippereulo albordeĝas ĉe la bordo de nekonata insulo. Kaj unue, la teritorion de popolo de robothomoj, kiuj vivas kvazaŭ en formikejo, kun teknikoj de sciencfikcio (almenaŭ por la epoko de la romano : 1935). Socio nur centrigita sur la kolektiva utileco, sen individuaj animstatoj.

La heroo amindumas virinon, kiu nur zorgas, ve ! pri sia kvoto de gravediĝoj. Trolacigita de tiu nesuperebla vivo, nia ŝippereulo petas esti ekzilata en la alian parton de la insulo, tie kie vivas tre malsimilaj homoj. Sed kia kontrasto !

En tiu alia universo, la estaĵoj estas ĉirkaŭprenitaj de multeco de nekompreneblaj tabuoj, neverŝajnaj kredoj kaj ekstravagancaj ritoj.


Fine, la ĉefrolulo de la romano sukcesos forfuĝi kaj en maro estos savita de ŝipanoj.

La leganto trovos longecojn en la dua parto de la libro kaj la stilo de Szathmári ne estas ekzempla sed la legado de la verkaĵo valoras nur se ĝi malfermas spacon al multaj filozofiaj pripensoj, pri la du prezentitaj homaj socioj :

Ĉu homsocio, nur bazita sur la «deino Racio», nur privilegianta efikecon, la kolektivan sukceson, ne kondukas, nesenteme, al la absoluta tiraneco ?

Inverse, ĉu la tagaj novaĵoj ne alportas al ni la malbonfarajn eĥojn de homaj grupoj, blindigitaj per ĉiuspecaj incititaj fanatikismoj ?

André FRANGEUL



Szathmári povas troviĝi en la listo de la satiristoj kaj utopiistaj aŭtoroj, kies genron oni ankaŭ retrovas en iuj nuntempaj filmoj.

Ni posedas de li novelarojn sed lia plej grava verkaĵo estas nekontestebla lia romano «Vojaĝo al Kazohinio».

L'appel d'Hiroshima

Dans le bulletin précédent, nous avons publié un appel d'Hiroshima lancé par un collectif d'organisations féminines pour un monde sans armes nucléaires. Mme Taeko Osiaka, une des organisatrices, a envoyé un compte-rendu de l'événement. En voici un résumé. Le texte complet (traduit), avec d'autres photos, est disponible à :

<http://www.ipernity.com/blog/32119/236227>

«Le 7 mars, lors d'une réunion avec 150 militantes du collectif, les participantes ont reçu sur papier les 344 messages provenant de 66 pays. Ils ont été exposés à Hiroshima plusieurs jours avant la Journée internationale de la Femme et vus par plus de 1000 visiteurs. Mme Ikeda, hibakusha, a raconté son expérience du bombardement atomique et a appelé à lutter ensemble pour l'abolition des armes nucléaires sur la planète. Pendant cette même réunion, Mme Abe Kyoko, présidente du comité exécutif, a remercié les espérantophones du monde entier pour leur collaboration. Il a été rapporté également qu'en Slovénie et en Suisse, des espérantophones ont organisé une exposition «Hirosima-Nagasaki». Les participantes ont ainsi pu sentir que de nombreux espérantophones travaillent pleinement pour la paix. Après la réunion, une manifestation a eu lieu dans la rue, en direction du Parc de la Paix, avec des fleurs et des appels à la Paix. Les messages seront portés à New-York, au mois de mai, pour la réunion de réexamen du Pacte de Non-Prolifération des Armes Nucléaires.»

La alvoko de Hiroŝimo

En la antaŭa bulteno, ni publikigis alvokon de Hiroŝimo dissenditan de virino-asociaro por mondo sen nukleaj armiloj. S-ino Taeko Osiaka, unu el la organizintinoj, sendis raporton pri la okazaĵo. Jen resumo pri ĝi. La originala teksto, kun pliaj fotoj, disponeblas ĉe :

<http://www.ipernity.com/blog/32119/234640>

«La 7-an de marto, en kunveno kun 150 aktivulinoj, la partoprenantoj papere ricevis la alvenintajn mesaĝojn : 344 el 66 landoj. Ili estis ekspoziciitaj ĉe Placo por la Urbana Interŝanĝo unu semajnon, kaj ĉe Virina Eduka Halo de Hiroŝima unu semajnon antaŭ la Virina Tago. Pli ol 1000 civitanoj venis al ĝi. S-ino Ikeda, hibakuŝo, prelegis sian sperton sub atombombado kaj alvokis kune lukti por nuligo de nuklearmiloj sur la tero. Ĉe la kunveno s-ino Abe Kyoko, prezidanto de la plenuma komitato, esprimis dankon al Esperantistoj, kiuj sendis la mesaĝojn. Oni raportis ankaŭ, ke en Slovenio kaj



Svisio Esperantistoj bele organizis ekspozicion de Hirosima-Nagasaki ! Ankaŭ per tio la partoprenintoj de la kunveno sentis, ke multaj Esperantistoj plene laboras por paco. Post la kunveno la ĉeestantoj manifestaciis kantante, tenante florojn, alvokante pacon sur strato al Paca Parko. La mesaĝojn oni portos al Nov-jorko, en majo 2010, por la kunveno de reekzameno de Pakto de Ne-disvastigo de Nukleaj Armiloj.»

Nia kuirada recepto

RAGOÛT AUX ÉPICES pour 4 personnes

Cuisson

Découper la viande en petits morceaux et faire revenir dans le beurre 3 minutes.

Ajouter la farine et brasser rapidement, verser le bouillon très chaud, bien mélanger le tout et laisser cuire 5 minutes. Retirer du feu.

Mélanger les jaunes d'œufs avec le vin blanc et la crème. Verser sur le ragoût. Épicer généreusement en sel et poivre.

Répartir le ragoût dans 4 petits récipients allant au four. Parsemer de fromage râpé et mettre au four préchauffé à 220-240° pendant 15 min.

Servir le ragoût avec le jus de citron, la sauce épicée, des toasts ou du pain blanc. Bon appétit.

Ingrediencoj :

500g de viande blanche pré-cuite
 3-4 cuillerées à soupe de beurre
 2 cuillerées à soupe de farine
 1 tasse de bouillon
 2 jaunes d'œufs
 3 cuillerées à soupe de vin blanc
 3 cuillerées à soupe de crème
 sel, poivre noir
 jus de citron
 fromage râpé
 sauce épicée

RAGUO EN SPICA SAŬCO

por kvar personoj



Ingrediencoj :

500g da kuirita blanka viando
 3-4 supkuleroj da butero
 2 supkuleroj da faruno
 1 taso da buljono
 2 ovoflavoj
 3 supkuleroj da blanka vino
 3 supkuleroj da kremo
 salo, nigra pipro
 citronsuko
 raspita fromaĝo
 spica saŭco

Kuirado

Distranĉu la viandon en pecetojn kaj brezu ĝin en butero dum 3 minutoj. Aldonu la farunon turnmovu rapide ĉion, surverŝu varmegan buljonon, miksu bone kaj kuiru ĉion dum 5 minutoj.

Neplu kuiru. Kiru la ovoflavojn kun blanka vino kaj dolĉa kremo, verŝu ĝin al la raguo, spicu forte per salo kaj pipro.

Metu la raguon en kvar malgrandajn bakformrezistajn ujojn, surverŝu la fromaĝon.

Baku ĝin en antaŭhejtitita bakforno je 220-240° dum 15 minutoj.

Nun kompletigu la raguon per citronsuko, la spica saŭco, toastoj aŭ blanka pano.

Bonan apetiton deziras. (DOJO)

MERCREDI 26 MAI à ANGERS

18h30 - Salle des Jonchères
 (Avenue Jean XXIII, La Roseraie)

Maurice Foucher,
 du groupe de Nantes,
 nous présentera son
 séjour en Tanzanie où il a rencontré
 Mramba, le Tanzanien
 qui nous a rendu visite il y a 2 ans.



La conférence sera en espéranto.



«**MONTRÉSOR**»
 ou le bien nommé !

C'est un lieu d'excursion à découvrir à plus d'un titre : il compte parmi les 151 plus beaux villages de France.

Dans ce village, les maisons aux murs de tuffeau blanc ou à colombages côtoient des habitations semi-troglodytiques.

Un château perché sur un éperon rocheux domine la vallée de l'Indrois. Sa visite est riche d'histoire et d'un patrimoine acquis au cours des âges : La halle des cardeux rappelant par son nom le travail de la laine qui fit la fortune du village jusqu'à la révolution, le lavoir, l'ancien four banal, la très belle collégiale St.Jean Baptiste, le pont du jardinier construit par les ateliers Eiffel. Mais ces visites à travers un village des plus pittoresques doivent inmanquablement conduire à la rivière pour y découvrir un étrange monument accouplé à un système ancien de pompage de l'eau : le bélier hydraulique.

Guy Guétault, un génial bricoleur, de surcroît espérantiste, s'intéressa à cette pompe qui avait cessé ses fonctions en 1958. Pendant 2 ans, Guy chercha, peina, transpira, pour adapter et redonner à cette machine toute l'énergie nécessaire pour animer son invention créée en hommage à l'espéranto : une étoile géante tournant sur elle-même entraîne un globe terrestre entouré d'enfants symbolisant les 5 continents. Cette installation «vivante» illustre parfaitement l'âme de l'espéranto.

La pompe bélier dont le principe de fonctionnement est clairement expliqué par un panneau, propulse l'eau qui permet à l'installation de s'animer.

Un charmant village niché dans un écrin de verdure, une machine à eau d'un autre âge et une œuvre espérantiste étonnante... quelles bonnes raisons pour passer une journée à la découverte de la campagne tourangelle !

«**MONTRÉSOR**»
 aŭ la bone nomata !

Vizitinda loko pro pluraj kialoj : Montrésor estas unu el la 151 plej belaj vilaĝoj el Francio. En tiu vilaĝo, la domoj konstituitaj per muroj el blanka kalkoŝtono aŭ trabarmuroj apudas duon-trogloditajn loĝejojn.

Kastelo staranta sur roka sprono superas la valon Indrŭa. Ĝia vizito estas riĉa je historio kaj havaĵoj akiritaj iompostiome. La halo de la kardistoj, per sia nomo, rememorigas la lanlaboron kiu riĉigis la vilaĝon ĝis la revolucio, la lavejo, la malnova forno, la belega kolegio de Sankta Joan Baptisto, la ponto de la ĝardenisto konstruita de

la entrepreno Eiffel.

Sed tiuj vizitoj

tra plej piktureska vilaĝo nepre kundukas nin al la rivero por malkovri ĉe ties bordo strangan monumenton kunigitan al malnova sistemo : akvo batpumpilo.

Guy Guétault, lerta metiisto kaj krome Esperantisto, interesiĝis pri tiu pumpilo kiu ĉesis funkcii en 1958. Dum 2 jaroj Guy serĉadis, penis, ŝvitis por adapti kaj redoni al la maŝino ties tutan energion necesan por viviĝi sian inventaĵon kreita homaĝe al Esperanto : giganta stelo rotacias kaj movas terglobon ĉirkaŭatan de infana danĉorondo kiu simbolas la kvin kontinentojn.

Tiu «vivanta» konstruaĵo perfekte ilustras la animon de Esperanto.



Guy Guétault, le créateur de l'installation, au cours de l'inauguration en juin 2009

Guy Guétault, kreinto de la sinmovajo, dum la inaŭguro en junio 2009

L'installation en mouvement, entraînée par le bélier hydraulique
 La sinmovajo, funkcia dank'al la batpumpilo

Les personnages symbolisant l'humanité autour de la planète
 La figuretoj, simboloj de la homaro ĉirkaŭas la planedon



La batpumpilo (kies funkcioprincipo estas klarigata en panelo) spruĉante akvon, rotaciigas stelon kiu ĝiavice movas la karuselon.

Ĉarma vilaĝo en natura juvelujo, malnova akvobatpumpilo, kaj mirinda Esperantista konstruaĵo, jen tri bonaj instigoj por ekskursi kaj malkovri la Turan kamparon !



Ĉu vi memoras pri Andrei KOROBEINIKOV ?

En 2001 dum la 86-a UK de Zagrebo, kelkaj personoj el inter ni renkontis lin la unuan fojon. Tiam, ni jam diris ke li estas genio ; la vorto certe ne estis tro forta!

Malkovru ĉi sube parton de sia progresado (fonto : Claude Nourmont - UFE).

«Nia Andrei KOROBEINIKOV, rusa pianisto kaj Esperantisto, kiu debutis en Esperantio kiel 15-jarulo per la recitalo en UK86 en Zagrebo, Kroatio, 2001, kaj poste ludis ankaŭ en UK88 en Gotenburgo, Svedio, 2003, UK89 en Pekino, Ĉinio, 2004 kaj UK91 en Florenco, Italio, 2006, jam nun estas en la vico de la plej bone taksataj pianistoj de la mondo. Li ludas ĉefe en Eŭropo sed ankaŭ multe en Japanio.

Ek de 2007 li estas ĉiujare invitata de la unika festivalo de la klasika muziko "La Folle Journée" (LFJ) [la freneza tago], kiu okazas tramonde, en Nantes, Francio, Tokio kaj Kanazawa en Japanio, Brazilo k.a., kaj ankaŭ de 2006 de la plej grandskala piano-fes-

tivalo "La Internacia Piano-Festivalo de La Roque d'Antheron", Francio. Li ludis 8 koncertojn en majo 2009 en Japanio.»

Nia afabla kaj talentplena Esperanta pianisto Andrei KOROBEINIKOV, nun 23-jara, vivas en Moskvo sed ofte ludas en Francio.

Ĉifoje li ludis Francie en marto, en unika programo : ĉefe «Scriabin» la 11-an de marto 2010 en «Théâtre des Champs Elysées - PARIS» kun la «Orchestre National de France», direktita de Dmitri Liss (programo : Scriabin Koncerto por piano kaj orkestro op.20) kaj la 20-an de marto 2010 en «Arsenal - METZ» (recitalo programo : Scriabin ; Musorgski per la aranĝo de Andrei KOROBEINIKOV)

Li estas la venkinto de «Scriabina konkurso» en 2004 kaj en 2008 eldoniĝis



Post la spektaklo, la gratuloj

lia unua Kompakta Disko «Scriabine» el la franca diskkompanio MIRARE. La KD gajnis apartajn laŭdojn en francaj kaj alilandaj muzikgazetoj. Freŝdate de la sama diskkompanio MIRARE eldoniĝis lia dua KD : «Beethoven».

Do, de nun kaj pli kaj pli, multaj ŝancoj ludi en grandaj kaj gravaj okazoj tra la mondo estas promesitaj al li.

Brave! Andrei, kaj bonan ŝancon ...

Séjourner à Grésillon pour apprendre ou réapprendre l'Espéranto !

Restadi en Greziljono por lerni aŭ re-lerni Esperanton !



La Maison Culturelle de l'Espéranto propose chaque été des activités et événements autour de la langue internationale Espéranto

La Kulturdomo de Esperanto proponas ĉiusomere aktivaĵojn kaj eventojn en la internacia lingvo Esperanto



au cœur du Baugeois, près d'Angers,

17 juillet - 14 août 2010
château de Grésillon

cours d'espéranto

astronomie
traduction
théâtre
examens
etc...

Daniel	BIRO-WALKER
Aurora	BUTE
Christophe	CHAZAREIN
Tomasz	CHMIELIK
Evgeni	GEORGIEV
George	HANDZLIK
Nina	KORJENEVSKAIA
Jean-Luc	KRISTOS
Patrick	LAGRANGE
François	LO JACOMO
Caroline	MAUBOUSSIN
Thierry	SALADIN

Maison Culturelle de l'Espéranto - 49150 Baugé
Tél . 09 51 64 10 34

www.gresillon.org

Wikipedia ? Vikipedio !

<http://eo.wikipedia.org>

Vi jam scias, pri tio temas, ĉu ne ? Jes ja, temas pri la interreta plurlingva enciklopedio ! Ĝi estas kunredaktebla de ĉiuj, tio signifas, ke ankaŭ vi povas kontribui redaktante artikolojn ! Ĉu al vi mankas ideoj pri artikoloj ? Vi certe facile trovos : pri via vivloko, pri proksima monumento de vi bone konata, ktp. Vizitu ekzemple la Esperantan paĝon «Maine-et-Loire» (<http://eo.wikipedia.org/wiki/Maine-et-Loire>) kaj el ĝi vi trovos ligojn al la artikoloj pri Angers, Cholet, Loire, ktp.

Artikoloj ekzistas pri Cholet kaj Saumur... sed ne pri Segré, nek pri la Maine-rivero, nek pri Apocalypse, ktp. La (longa kaj bela) paĝo pri Angers ekzistas jam plurajn jarojn, la paĝo pri Terra Botanica estas novnaskito kaj la paĝo pri Camifolia (en Chemillé)

ek-aprile 2010 ekzistis nur en Esperanto kaj en la angla !

Kiel kontribui ? Facilas ! Kiam vorto aperas ruĝe, tio signifas, ke mankas artikolo, kiu atendas vin por naskiĝi ! Sufiĉas per muso alklaki la koncernan vorton kaj aperas paĝo, en kiu vi jam povas entajpi vian artikolon ! Eblas redakti artikolon aŭ traduki el jam ekzistanta alilingva artikolo. Vi povas labori sole aŭ grupe (kun samkursanoj,...), surloke post vizito al la monumentoj kaj lokoj... aŭ malproksime el alia kontinento, ktp. Ne timu pri eraroj : artikolo naskiĝas kaj poste kompletigatas per ĉies kontribuoj. Eĉ, ju pli da kontribuantoj, des pli bone !

Sciu ankaŭ, ke la Esperanto-grupo de Angers posedas multajn Esperantigitajn tekstojn pri lokaj vizitindaĵoj : la muzeo Jean Lurçat, la kastelo de Angers, la katedralo, ktp. Tiuj dokumentoj, tradukitaj antaŭ kelkdek jaroj aŭ por la departementa traduk-konkurso okazigita de Daniel Durand (antaŭ kelkaj jaroj prezidanto de la grupo), atendas vin por iĝi Vikipediaj artikoloj, por reviviĝi en la ret-mondon !

Ni atendas vian kunlaboron !

Vous informer

www.esperanto-angers.fr

www.esperanto-france.org
www.esperanto-jeunes.org
www.esperanto-sat.info
www.uea.org
www.esperanto.net

Nous contacter

Centre Angevin d'Espéranto

41 rue Pierre Melgrani 49000 Angers
 Tél. 02 41 73 17 97

Courriel : info@esperanto-angers.fr

Les dates à retenir

SAMEDI 5 ET DIMANCHE 6 JUNI 2010

Stand à la Fête Bio - Mûrs-Erigné

DIMANCHE 13 JUNI 2010

A 16h, en l'église St-Lazare du Mans, concert d'Interkant' avec des extraits du «Canto General» de Pablo Neruda. (contacter le Groupe Espéranto du Maine)

SAMEDI 3 ET DIMANCHE 4 JUILLET 2010

Festival «D'ailleurs... c'est d'ici»
 La Pointe-Bouchemaine



17 juillet-14 août 2010, à Baugé (France) :
Stages d'été à la Maison Culturelle de l'Espéranto «Grésillon»

Tél. 09 51 64 10 34 - www.gresillon.org

17 julio-14 aŭgusto 2010, en Baugé (Francio) :
Someraj staĝoj en la Esperanto-Kulturdomo Grezjono

Tél. 09 51 64 10 34 - www.gresillon.org

Congrès et rencontres en 2010

20-24 mai 2010, à Kaiserslautern (Allemagne) :
 Congrès franco-allemand d'Espéranto

19-23 juin 2010, à Oulan-Bator (Mongolie) :
 6ème congrès Asiatique d'Espéranto

17-24 juillet 2010, à La Havane (Cuba) :
 95ème Congrès Mondial d'Espéranto

24-31 juillet 2010, à Santa Cruz del Norte (Cuba) :
 Congrès International des jeunes espérantophones

01-06 août 2010, à Braşov (Roumanie) :
 83ème congrès de SAT

13-20 août 2010, à Toulouse (France) :
 FESTO 2010, Festival de musique espérantophone

14-21 août 2010, à Plouézec :
 Rencontres Internationales de Plouézec (pour apprendre l'espéranto, etc.)

De nombreux autres congrès et rencontres existent, on peut les trouver par exemple sur le site de la revue Eventoj : www.eventoj.hu

Kongresoj kaj renkontoj en 2010

20-24 majo 2010, en Kaiserslautern (Germanio) :
 Franc-Germana Kongreso de Esperanto

19-23 junio 2010, en Ulanbatoro (Mongolio) :
 6-a Azia Kongreso de Esperanto

17-24 julio 2010, en La Habana (Kubo) :
 95-a Universala kongreso de Esperanto

24-31 julio 2010, en Los Cocos, Santa Cruz del Norte (Kubo) :
 Internacia Junulara Kongreso (IJK)

01-06 aŭgusto 2010, en Braşovo (Rumanio) :
 83-a SAT-Kongreso

13-20 aŭgusto 2010, en Toulouse (Francio) :
 FESTO 2010, Junulara kaj Muzika Renkontiĝo

14-21 aŭgusto 2010, en Plouézec (Francio) :
 Somera renkontiĝo de Plouézec (por lerni Esperanton)

Planitaj estas multaj aliaj Esperanto-renkontiĝoj, troveblaj ekzemple en la retejo de Eventoj : www.eventoj.hu

Diversaĵoj

Senpaga vespero

« Ĉu vi babilas Esperante? Venu do trinki ion kun ni !

Ĉu tiu stranga invito allogas vin ? Ne estas friponaĵo, tamen tiu anonceto aperas en Geneva blogo. Iomete tro malproksime por tia amiko-vespero.

Esperanto-semajno en Strasburgo

Mardon la 20-an de aprilo, okaze de la Esperanto-semajno mallonga sekvenco elsendiĝis ĉe FR3 dum la tagmeza TV-jurnalo.

<http://info.francetelevisions.fr/video-info>

La regiono

- Ĉe Centre Culturel Nantes Espéranto, la venonta « Festo de la lingvoj » okazos sabaton, la 12-an de Junio 2010.

- Esperanto-Indre partoprenis ekspozicion pri libroj le 24-an kaj 25-an de aprilo en Châteauroux.

Sortie gratuite

Envie d'échanger quelques mots en Espéranto ? Venez vous essayer à la langue internationale autour d'un verre ! » Cette étrange invitation vous intéresse ? Ce n'est pas une arnaque, cependant cette annonce paraît dans un blog de Genève. Un peu loin pour une soirée entre amis.

Semaine de l'Espéranto à Strasbourg

Mardi 20 avril, une courte séquence à l'occasion de la semaine de l'espéranto est passée sur FR3 pendant le journal de midi.

<http://info.francetelevisions.fr/video-info>

La région

- Au Centre Culturel Nantes Espéranto, la prochaine « Fête des Langues » aura lieu le samedi 12 juin 2010.

- Esperanto-Indre a participé à un Salon du Livre les 24 et 25 avril à Châteauroux.



Funebro en nia Esperantista familio

Claude Jean forpasis en februaro.

Li aliĝis nian grupon antaŭ ses jaroj. Kuraĝe, li forte batalis kontraŭ sia malsano.

Ĉiam bonhumora kaj afabla, Claude restas en nia memoro kiel fida amiko.